3.ª Epoko * N.° 96 : : Majo * 1925 : :

LA SUNO HISPANA

Organo de la hispanaj esperantistoj * Organo de los esperantistas españoles

Fondinto: AUGUSTO JIMENEZ LOIRA

Redakcio: Mar, 23 = VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos

Direktoro: M. CAPLLIURE

REAL ORDEN

Excmo. Sr.: S. M. el Rey (q. D. g.), ha tenido a bien designar al Teniente coronel de Estado Mayor, D. Vicente Inglada, con destino en la Escuela Superior de Guerra, y al Comandante de Ingenieros del Servicio de Aviación, D. Emilio Herrera, para que asistan, en unión de D. Leonardo Torres Quevedo, nombrado por el Ministerio de Instrucción Pública, en representación de España, a la Conferencia internacional para el empleo del Esperanto en las ciencias puras y aplicadas que se verificará en París, los días 14, 15 y 16 de mayo próximo.

Tendrán derecho los dos Jefes a las dietas reglamentarias, a los viáticos en el recorrido extranjero y a viajar por cuenta del Estado en el territorio nacional, a más de los devengos que por razón del empleo, antigüedad y destino les corresponda.

De Real orden lo digo a V. E. para su conocimiento y demás efectos.

Dios guarde a V. E. muchos años. —Madrid, 10 de marzo de 1925. —El General encargado del despacho, *Duque de Tetuán*.

(*Gaceta* de Madrid del 12 de marzo de 1925, página 1.288).

Notoj de leganto

Kun ĝojo mi konstatis, leginte la aprilan numeron de LA SUNO HISPANA ke laŭ la plioftiĝo de priesperantaj sciigoj en hispanaj gazetoj aŭ revuoj, oni nin konsideras kiel «preskaŭ» utilajn homojn. Se ne multe, almenaŭ iom tio jam valoras. Sed la kampon de naciaj revuoj ni devas pli intense ankoraŭ plugi. Nia celo estu, ke neniu iom grava gazeto, ĵurnalo aŭ revuo aperu, ne publikigante de tempo al tempo artikolojn pri aŭ en Esperanto. Jam ekzistas, krom la cititaj en LA SUNO HISPANA, pliaj eldonaĵoj pritraktantaj la Esperantismon. Ekzemple *El Socialista* de post proksimume du monatoj aperigas ĉiusemjne bonredaktitajn Esperanto-komunikojn de nia Kordova samideano F. Azorín. Ni imitu kaj plukonkeru! Bone kaj efike verkitaj artikoloj certe havas la ŝancon esti akceptataj. Eble oni povus krei specialan gazetaran servon, kies tasko estus provizi la ĵurnalojn per taŭga materialo por publikigo. Tiu gazetara servo kompreneble devus baziĝi sur bone funkcianta raportado el ĉiuj grupoj al unu centro. Miaopinie apartenu la direktado de la gazetara servo al la sekretario de HEA (Hispana Esperanto Asocio)—aŭ kian ajn nomon oni donos al la hispana organizaĵo. Eventuale estus eĉ preferinde komisii specialan konstantan raportanton, kiu nature devus esti membro de l' estraro de nomita societo.

Ne necese, ke ni disvastigu *nur* priesperantajn sciigojn. Certe, ilin unuavice. Taŭgaj komunikindaĵoj estas troveblaj en nia tutmonda esperanta ĵurnalaro. Sed verŝajne havus ankaŭ konvinkan forton ekz. tradukoj el *originala* esperanto-literaturo. La hispanlingva rimarko «tradukita el la esperanta originalo» komence aŭ fine certe altirus la atenton. Por tio ni posedas riĉan, eĉ neelĉerpeblan fonton en la konkursaĵoj de la ĉiujaraj Internaciaj Floraj Ludoj. Ili, kaj tio estas granda avantaĝo, estas juĝitaj de internacia komitato kaj tial kredeble bonaj laŭ stilo kaj enhavo.

Ekprovi oni povus ĉi tiun aferon, ĉu ne?

Skribante tion venas en mian kapon la penso, ĉu kaj kiam aperos la unua hispana romano esperante verkita, romano ne kelkdekpaĝa, sed ampleksa kiel ekz. «Stranga heredaĵo», «Pro Iŝtar» de Luyken aŭ «Abismoj», «Saltego trans jarmiloj» de Forge, dika bele bindita libro. Kiam ĝi aperos? Kaj kiu estos la verkonto? Tutmondan intereson ĝi certe trovus!

JOBO.

Córdoba.

Pri la nomo de nia nacio

Kiam maro el glacio invadis Eŭropon, ĉi tiu fariĝis neebla por la vivo eĉ ĉe la norda parto de nia lando, kiu tiam estis parto el granda terpeco de la nordaj montaroj ĝis la montaro *Atlas* de Maroko, ĉar ankoraŭ la markolo de *Gibraltar* ne fariĝis. De la rando de la glacia maro, plibone de la montaro *Morena*, ĝis la

Acerca del nombre de nuestra nación

Cuando los glaciares invadieron Europa, ésta se hizo imposible para la vida, hasta en la parte Norte de nuestro país, que era entonces parte del territorio comprendido entre nuestras montañas del Norte hasta la cordillera del *Atlas*, en Marruecos, pues aún no se había abierto el estrecho de *Gibraltar*. Del extremo

montaro *Atlas*, loĝis la homo. Kaj kiam la glaciejoj fandiĝis, la homo preteriris la Pireneon norden, anstataŭ veni de la nordo suden.

Hodiaŭ oni konstatis, ke la unuaj loĝantoj de nia teritorio, antaŭ kaj post la kuniĝo de la Mediteranea kaj Atlantika maroj, estis el sama raso, estis *bereberoj*, kies tipo ankoraŭ persistadas pura en kelkaj lokoj de la teritorio, precipe en la montaro de *Ronda*. El sama raso ankaŭ estis la unuaj loĝantoj de la insuloj *Canarias*, la *Guanches*. Ĉi tion pravigas la komparata prahistorio, la monumentoj megalitaj de Portugalujo, Andaluzio kaj aliaj regionoj de nia teritorio, kaj tiuj de Maroko.

Estas neakcepteble kaj neakceptinde konsideri la *Iberojn unuaj loĝantaj de nia lando*. Tiu popolo estis invadanta la landon, kaj venis de la antikva *Iberio*, lando de la Kaŭkazo, kiu estas nun *Georgio;* tiu gento sin loĝigis ĉe parto de nia lando, ĝi okupis la nordorientan, orientan kaj sudan regionojn, je 1300-1200 jaroj antaŭ Kristo; sed oni devas konstati, ke la *Iberoj* ankaŭ sin loĝigis ĉe la atlantikaj marbordoj de Francujo kaj ĉe Irlando. La *Iberoj*, konservante agrablan memoron pri la forlasita patrujo, donis al montaroj, riveroj, urboj, k. c., de nia teritorio, nomojn *iberajn*: la nomo *Aralar* rememorigis al ili la monton *Ararat;* la rivero *Arasces*, kiu naskiĝas ĉe la piedo de la montaro *Aralar*, ŝuldas sian nomon al rivero *Araxes*, kiu fluas kiel landlimo inter *Armenujo* kaj *Iberio* (nuna *Georgio);* la nomoj *Ebro*, *Arga* kaj *Aragon*, rememorigas la riverojn *Ibero* kaj *Arago*. La urboj, de la antikva *Iberio*, *Maranda*, *Deba* kaj *Degia* estas rememorigataj de *Miranda de Ebro*, *Deva* kaj *San Esteban de Deyo (Monjardín)*.

Sekvante la *Iberojn*, venis al nia lando la *Keltoj*, fratoj de tiuj, kiuj, forlasinte la patrujon kaj sin loĝiginte trans la *Uraloj*, forlasis la novan patrujon, kaj fine venis okupi parton de *Asturias* kaj *León*, *Ga-*

del mar de hielo, mejor, desde *Sierra Morena* hasta el *Atlas*, habitó el hombre. Y cuando los glaciares se fundieron, el hombre atravesó los Pirineos, yendo hacia el Norte, en vez de venir del Norte al Sur.

Hoy se ha comprobado que los primeros habitantes de nuestro territorio, antes y después de la unión de los mares Mediterráneo y Atlántico, fueron de la misma raza, fueron *bereberes*, cuyo tipo aún persiste puro en algunos lugares del territorio, principalmente en la *Serranía de Ronda*. De la misma raza también fueron los primeros habitantes de las *Islas Canarias*, los *Guanches*. Esto lo comprueba la prehistoria comparada, los monumentos megalíticos de Portugal, Andalucía y otras regiones de nuestro territorio y los de Marruecos.

Es inaceptable desde todos los puntos de vista, considerar a los *Iberos primeros habitantes de nuestro país*. Ese pueblo fué invasor del país, y vino de la antigua *Iberia*, país del Cáucaso, que en la actualidad es la *Georgia;* esa gente se instaló en parte de nuestro país, ocupó las regiones Noroeste, Este y Sur, de 1300 a 1200 años antes de Cristo; pero se debe hacer constar que los *Iberos* también se instalaron en las costas atlánticas de Francia y en Irlanda. Los *Iberos*, conservando una dulce nostalgia de la patria abandonada, dieron a las montañas, ríos, ciudades, etc., de nuestro territorio, nombres *iberos:* el nombre *Aralar* les recordaba el monte *Ararat;* el río *Arasces*, que nace al pie de la *Sierra de Aralar*, debe su nombre al río *Araxes*, que fluye como frontera entre *Armenia* e *Iberia* (la actual *Georgia);* los nombres *Ebro*, *Arga* y *Aragón*, recuerdan los ríos *Ibero* y *Arago*. Las ciudades de la antigua *Iberia*, *Maranda*, *Deba* y *Degia*, están recordadas por *Miranda de Ebro*, *Deva* y *San Esteban de Deyo (Monjardín)*.

Siguiendo a los *Iberos*, vinieron a nuestro país los *Celtas*, hermanos de aquéllos, que, habiendo abandonado la patria e instaládose tras de los *Urales*, abandonaron la nueva patria y, finalmente,

licia'n kaj *Portugalujon*, la regionojn montarajn de la nordokcidento kaj marbordojn de la *Atlantika* maro, ĉar tiu-ĉi gento estis montara. Same kiel la *Iberoj*, ili donis nomojn de la forlasita patrujo al lokoj, promontoroj, k. c., de la nova.

Interkonsentoj kaj ligoj de *Keltoj* kaj *Iberoj*, de iuj gentoj, ĉar ambaŭ popoloj vivis laŭ gentoj tute aŭtonomaj, sekvigis popolon *Keltiberan*, kiu okupis centran parton de la lando.

Tial oni ne povas nomi fundamente *Iberio* la tutan preskaŭinsulon, nek *Keltio*, nek *Keltiberio*.

Antikve, la *Grekoj* donis al nia preskaŭinsulo la nomon *Hesperia*, nomo tute fremda je ĉiu milito, konkiro, subpremado; male, ĝi estas poeta nomo, kiun donis al ĝi la *Grekoj* por montri la landon de Okcidento trans kiu malaperadas la Suno, kaj kiu estis tiam la limo de la mondo konata de ili, kaj tial ke super ĝia horizonto, je la sunkuŝiĝo, brilas *Vespero* aŭ *Hespero (Venuso)*. Pli akceptinda estus ĉi tiu alnomo.

Ĉiujn romanajn provincojn de la preskaŭinsulo entenas la nomo *Hispania*, vorto devenanta de la grekaj *ispania* kaj *spania*, kiun latinigis la Romanoj, sed kies etimologio venas de alia plej malnova origino. Generale oni forlasis opinion pri deveno de la fenicia vorto *span*, kies signifo estas *kuniklo*. Studante la etimologion de *Hispania*, oni konstatas, ke tiu-ĉi nomo estas la propra kaj ĝusta por la preskaŭinsulo, ĉar ĝi estas sekvo de ĝia situacio geografia kaj de ĝia formo: la vorto kelta *spann (piedo)* havas saman radikon, kian la germanaj *spann (piedo*, ankaŭ), *spanne (manplato)*, *spannen (ampleksiĝi)* kaj *spannung (deirloko)*; kaj efektive, la preskaŭinsulo estas kvazaŭ *piedo* de Eŭropo; ĝia teritorio estas, laŭ sia formo, kvazaŭ *manplato* de dekstra mano al kiu oni estus amputinta la kvin fingrojn, kaj por tion konscii, desegnu dekstran manon prezentantan la manpla-

vinieron a ocupar parte de *Asturias* y de *León*, *Galicia* y *Portugal*, las regiones montañosas del Noroeste y costas del Atlántico, pues este pueblo era montañés. Lo mismo que los *Iberos*, dieron nombres de la patria abandonada a lugares, promontorios, etc., de la nueva patria.

Acuerdos y ligas entre *Celtas* e *Iberos*, de algunas tribus, pues ambos pueblos vivieron disgregados en tribus completamente autónomas, dieron lugar al pueblo *Celtíbero*, que ocupó la parte central de nuestro país.

Así, pues, no se puede con fundamento llamar *Iberia* la península completa, ni *Celtia*, ni *Celtiberia*.

Antiguamente, los *Griegos* dieron a nuestra península el nombre *Hesperia*, nombre ajeno por completo a toda guerra, conquista, opresión; por el contrario, es un nombre poético, que le dieron los *Griegos* para indicar el país de Occidente, tras del cual desaparece el Sol y que era entonces el límite del mundo conocido por ellos, y puesto que sobre su horizonte, a la puesta del sol, brilla *Vespero* o *Hespero (Venus)*. Más digno de aceptación sería este nombre.

Todas las provincias romanas de la península están comprendidas en el nombre *Hispania*, vocablo que viene de los griegos *ispania* y *spania*, que latinizaron los romanos, pero cuya etimología viene de un origen más remoto. En general, se abandonó la opinión de que procediera de la raíz fenicia *span*, que significa *conejo*. Estudiando la etimología de *Hispania*, se comprueba que este nombre es el propio y exacto para la península, por ser consecuencia de su situación geográfica y de su forma; la palabra celta *spann (pie)* tiene la misma raíz que las alemanas *spann* (también *pie)*, *spanne (palma de la mano)*, *spannen (extenderse*—en tensión—) y *spannung (punto de partida)*; y, efectivamente, la península es como el *pie* de Europa; su territorio es, por su forma, como la palma de una mano derecha a la que se hubiesen amputado los cinco dedos, y para compren-

ton al vidanto, kun la kora fingro suben laŭ la vertikala linio kaj ĉiuj malfermataj streĉite kiel eble plej, kaj jen: la manradiko estas la kuniĝo kun Francujo; la radiko de la dika fingro, de la promontoro *Ortegal* al promontoro *Finisterre;* tiu de la montra fingro, la promontoro *San Vicente;* tiu de la kora fingro, *Tarifa;* tiu de la ringa fingro, la promontoro *Gata*, kaj tiu de la malgranda fingro la promontoro *Nao*. La preskaŭinsulo estas kvazaŭ *ampleksiĝo streĉita (spannen)* de la *eŭropa Kontinento* preter limon, kiun oni povas konsideri esti la *Pirenea Montaro;* ankaŭ ĝi estas kvazaŭ *deirloko (spannung)*. Se ni konsiderus la anglan vorton *spanner (eniro, ŝlosilo)*, tute klare estas, ke ĝi estas *enirejo de Eŭropo* kaj *de la Mediteranea Maro* kaj *ŝlosilo de ĉi tiu Maro*. La nomo *Hispania* alkonformiĝas, do, kun la formo kaj situacio de la preskaŭinsula teritorio; ĝi estas donita, tial, de la Naturo mem, ne de la kaprico aŭ volo de tiu aŭ alia el popoloj venintaj al ĝi kaj sin loĝigintaj ĉe ĝi. Tial oni konscias, kiel la Portugaloj sin konsideras Hispanoj, konsciante la *hispanismon* kiel *supernaciismon*, kaj tion rimarkigas la fama portugala historiisto *Oliveira Martins*, kiam, parolante pri *Os Lusiadas*, diras ke la poemo de *Camoens* estas kiel *la blazono de la Historio de la tuta Hispanujo (ne de Iberio)* ĉar, laŭ li diras, la signifo religia de la poemo *ne estas aparta, sed ĝenerala; ne ĝuste portugala, sed hispana*, tial ke li trovas en la kuraĝa sento patrujamanta de la poemo *tiom da senco aragona kaj kastilja, kiom da portugala*. Ankaŭ oni devas konstati, ke ĉiam oni nomis la Portugalojn *Hispanoj* en pasinta tempo.

Nu; la nomo de nia nacio devas nepre esti *Hispanujo*, kaj kiu ajn tutlanda esperanta organizaĵo devas esti nomata *Hispana*, ne *Iberia*. Por ni, Esperantistoj, des pli; tial ke *Hispanujo*, estas pli internacia radiko kaj sola, dum *Iberio* koncer-

derlo así, dibújese una mano derecha presentando la palma al que ve, con el dedo corazón hacia abajo y en la línea vertical, y todos los demás abiertos en tensión lo más posible, y se tendrá: la muñeca en su arranque la unión con Francia; la raíz del pulgar, del cabo *Ortegal* al *Finisterre;* la del índice, en el cabo de *San Vicente;* la del corazón, en *Tarifa;* la del anular, en el cabo de *Gata*, y la del pequeño, en el cabo *Nao*. La península es como un *ensanchamiento en tensión (spannen)* del *Continente europeo* más allá de un límite, que se puede determinar, fuese los *Pirineos;* también es como el *lugar* o *punto de partida (spannung)*. Si se tiene en cuenta la palabra inglesa *spanner (entrada, llave)*, completamente, claro está que es la *entrada de Europa* y *del Mar Mediterráneo*, y la *llave de este Mar*. El nombre *Hispania* está de acuerdo, pues, con la forma y situación del territorio peninsular; ha sido dado, pues, por la misma Naturaleza, no por el capricho o voluntad de uno u otro de los pueblos que a él vinieron y en él se asentaron. Por cuya razón se concibe cómo los Portugueses se consideran *Hispanos*, considerando el *hispanismo* como un *supernacionalismo*, y así lo hace notar el famoso historiador portugués *Oliveira Martins*, cuando, hablando de *Os Lusiadas*, dice que el poema de *Camoens* es como *el blasón de la Historia de toda España (no de Iberia)*, porque, según él dice, la significación religiosa del poema *no es particular, sino general; no solamente portuguesa, sino española;* puesto que él encuentra en el sentimiento valeroso y patriótico del poema, *tanto sentimiento aragonés y castellano, como portugués*. También debe hacerse constar, que siempre se llamó a los Portugueses *Hispanos* en épocas pasadas.

Pues bien; el nombre de nuestra nación debe ser desde luego *España*, y cualquier organización esperantista de todo el territorio debe llamarse *hispana (española)*, no *Ibérica*. Para nosotros, Esperantistas, con mayor razón; puesto que

nas tre malnovan landon, poste parton de Okcidenta Eŭropo (parton de Francujo, Irlando kaj Hispanujo), kaj fine parton de Hispanujo, tiun, kiun okupis la *Iberoj.*

JULIO MANGADA ROSENÖRN.

España es vocablo más internacional y único, mientras que *Iberia* se refiere a un país antiguo, después a parte de la Europa Occidental (parte de Francia, Irlanda y España), y últimamente a una parte de España, la que ocuparon los *Iberos.*

La lingvojn oni ne elpensas

LUCANOR»

Antaŭ kelke da tempo mi legis tion ĉi en iu artikolo. Iom ŝanceliĝa mi restis pro tia certigo, ĉar la saĝa filologiisto hispana, Benot, en sia verko *Arkitekturo de la lingvoj* certigas ke ĉiuj idiomoj estas artefaritaj kaj sekve, mi aldonas, elpensitaj.

Estas vero ke Lucanor aldonas poste: «La lingvoj estas plia natura produktaĵo». Mi dirus eklektike: «La lingvoj estas plia artefarita natura produktaĵo», kio eble estus aprobata de Benot, ĉar efektive, de la vidpunkto de artefariteco decas konsideri pli natura nacian idiomon, kiu estis elpensita iom post iom kaj konforme al la bezono de vortoj, ol idiomo kiel Esperanto, kiu aperas neatendite kaj je unu sola fojo. Tiu ĉi daŭrigas poste ankaŭ en sia disvolviĝo la irmanieron de la aliaj idiomoj, elpensante la vortojn laŭbezone; sed en la komenco ĝi ne agis tiamaniere, la 900 radikvortoj de la unua vortaro venis kune.

Aŭ mi ne komprenas la signifon de la vortoj *natura* kaj *artefarita*, aŭ mi opinias, kvankam ĝi ŝajnas paradoksa, ke pli natura estas Esperanto, ol la naciaj lingvoj. Al la hispana lingvo oni povas demandi, kiel ĝi elpensis la vortojn *mano*, *alta*, *buena*, *grande*, *atribuir*, *interna*, k. c., sed al Esperanto ne, ĉar, tiu-ĉi uzas mano, alta, bona, granda, atribui, interna, k. c., elĉerpante la radikojn plene el la hispana lingvo, kaj tion, kion mi

«Las lenguas no se inventan

LUCANOR»

Hace algún tiempo leí esto en un artículo. Algo perplejo me dejó tal afirmación, porque el sabio filólogo español, Benot, en su obra *Arquitectura de las lenguas* afirma que todos los idiomas son artificiales y, por tanto, añado yo, inventados.

Es verdad que Lucanor añade después: «Las lenguas son un producto natural más». Yo diría eclécticamente: «Las lenguas son un producto artificial natural más», con lo que tal vez se aviniera Benot, pues, efectivamente, dentro de la artificialidad cabe considerar más natural un idioma nacional, que se va inventando paulatinamente y a medida que se necesitan las palabras, que un idioma como el Esperanto, que se presenta de sopetón y de una sola vez. Este sigue después también en su desarrollo la marcha de los otros; inventa las palabras a medida que las necesita; pero al principio no lo ha hecho así; las 900 raíces del primer diccionario vinieron juntas.

Si es que yo no comprendo la significación de las palabras natural y artificial, creo, aunque parezca paradójico, que es más natural el Esperanto que los idiomas nacionales. Al idioma español se le puede preguntar cómo ha inventado las palabras mano, alta, buena, grande, atribuir, interna, etc.; pero el Esperanto no, porque este emplea *mano, alta, bona, granda, atribui, interna*, etc., tomando las raíces íntegramente del español, y lo que

diras pri tiuj vortoj, mi rediras pri tiuj ĉi kaj pri aliaj de Esperanto rilate al la ceteraj eŭropaj lingvoj.

Oni povas diri pri Esperanto, ke ĝi estas kopiaĵo; sed efektive ĝi estas malpli elpensita ol iu ajn nacia idiomo.

Poste Lucanor diras ke Esperanto estas «Lingvo corpdifekta». Kial? Mi juĝas ĝin mirinda kaj pli multe korpoperfekta ol hispana lingvo, kiu estas la sola idiomo kun kiu mi kuraĝas ĝin kompari, tial ke ĝi estas mia patrolingvo, kiun mi ja scipovas sufiĉe bone.

Resume: Ke mi estas konforma kun S-ro. Eduardo Benot pri tio ke ĉiuj idiomoj estas artefaritaj kaj mi ne konsentas kun Lucanor pri tio ke nur al Esperanto okazas tia malfeliĉo.

(El *La Vaska Popolo*, grava jurnalo el Bilbao de la 15ª aprilo lasta).

Tradukis, F. S.

digo de estas palabras, repito de ellas y de otras del Esperanto con relación a los demás idiomas europeos.

Se puede decir del Esperanto que es un plagio; pero en realidad es menos invento que cualquier idioma nacional.

Después llama Lucanor al Esperanto «Lengua contrahecha». ¿Por qué? Yo la encuentro admirable y mucho mejor bien hecha que el español, única lengua con que me atrevo a compararla por ser mi lengua patria y saberla, claro está, relativamente bien.

En resumen: Que estoy conforme con D. Eduardo Benot en que todos los idiomas son artificiales y no lo estoy con Lucanor en que sólo al Esperanto le toca esta desgracia.

VÍCTOR O. DE ALLENDE.

(De *El Pueblo Vasco*, importante diario de Bilbao, del 15 de abril último).

Modesteco

Iun vesperon, promenante tra la Parko de l' Retiro, mi haltis por aŭskulti najtingalon kiu kantis sur arbo. Iom pli poste, alia promenanto, solulo kiel mi, haltigis la paŝadon ankaŭ; poste ankaŭ alia, kaj alia.

Post nelonga momento, formiĝis grupo, preskaŭ publiko. La najtingalo, sentante sin admirata, duobligis siajn trilojn kaj ĝi kantis ilin ĉiufoje pli mildaj kaj armoniaj. La promenantoj rigardis unuj la aliajn ravitaj kaj ridetis kun admiro. Unu el ili ne povis teni ĝin pli da tempo, kaj ekkriis:

Brave! Aliaj ekkriis ankaŭ: *Brave!*; kaj eksplodis aplaŭdo.

La najtingalo silentis subite kaj flugis for, kaj ne plu reaperis tie.

Ĝi estis la sola artisto vere modesta, kiun mi konis dum mia vivo.

El hispana lingvo tradukis,

ANTONO DURÁ.

Modestia

Una tarde, paseando por el Parque del Retiro, me paré a escuchar a un ruiseñor que cantaba sobre un árbol. Poco después, otro paseante, solitario como yo, detuvo el paso también; luego otro también, y otro.

Al poco rato, formóse un grupo, casi un público. El ruiseñor, como se sintiera admirado, redoblaba sus trinos, y los hacía cada vez más dulces y armoniosos. Los paseantes se miraban los unos a los otros extasiados y sonreían con admiración. Uno de ellos no pudo reprimirla más tiempo, y exclamó:

¡Bravo! Otros exclamaron también: *¡Bravo!*; y estalló un aplauso.

El ruiseñor calló repentinamente y se alejó volando, y no volvió a aparecer por allí.

Fué el único artista modesto de verdad que he conocido en mi vida.

ARMANDO PALACIO VALDÉS.



LA TRIUMFANTO

Grava konkurso pri rapidireco
Iam okazis, mi ne scias kie,
Ĉiuj konkursis kun avidemeco,
Nur unu venkis ĉiujn, ĉiam, ĉie.


Granda testudo diris fanfarone:
Mi preterpasos sage, en tempero,
Fulme, senhalte, vigle, senbezone,
Ĉiujn limbordojn de la tuta tero.

Mi ĉirkaŭiros, diris l' elefanto,
Tutan terglobon, mia rapidiro
Estos simila al lingv' Esperanto,
Kiam ekkreskis ĝia mondrondiro.

Iam la struto vetis en dezerto
Kun la gazelo rapidegiranto,
La fulmirado estis grava sperto,
Venkis la struto, la senlacemanto.

Diris la aglo fikse rigardante
Per la okuloj Novan Kontinenton:
Mi orienten rapidegflugante
Plej facilege tuŝos l' okcidenton.

Marojn, riverojn, krutajn montegarojn,
Valojn, herbejojn, tra la kontinentoj,
Fulme trairis, ombrajn montegarojn,
La uragano puŝata de l' ventoj.



Ĉesu la spaco, trafa vagonaro
Diris fiere, mia ĉirkaŭiro
Manojn kunigos de la homidaro,
De l' oriento ĝis la sunsubiro.

Se la ventego bruas sur la monto,
Kaj la nubegoj kovras l' atmosferon,
Tondro blekegas sur la horizonto,
Kaj resonadas sur la tutan teron.

La telegrafo diris al la menso:
Mi senfadene kaj ĉiudirekte
Disvastigados fulme, kiel penso,
Viajn ideojn, plenrapide, rekte.

Se potencega fulmotondro iam
Volas transsendi sian lumon ien,
Kaj rebrilegi l' atmosferon, ĉiam
Sendas la fulmon, fulmirante ĉien.

Tutrapidege la aeroplano
Ĉirkaŭiradis tutan la terrondon,
Kelkajn post tagojn, kiel turismano,
Ĝi rigardadis la belegan mondon.

En Novo-Jorko nian Esperanton
Oni kantadis, ĝin prenis radio,
Tra la etero novan belan kanton
Oni SAMTEMPE aŭdis en Tokio.

PASTRO MARIANO MOJADO.

Radio-Esperanto Fako

La ĉiutage kreskanta radio-movado tutmonda multe favoras nian esperantan aferon, kiu, kiel ni antaŭvidis de la unua momento, estos necesa kaj nepra helpilo adoptata de ĉiuj radio-societoj ĝenerale.

Krom la sciigoj, kiujn niaj legantoj jam konas, pri akcepto de Esperanto ĉe la plej gravaj internaciaj radio-asocioj, ni publikigas la sekvantajn sciindaĵojn, kiuj estas pruvo de nia antaŭdiro:

«Kurso de Esperanto ĉe Radio - Barcelona

La graveco ĉiun tagon pligranda, kiun estas atinginta la helpa internacia idiomo Esperanto en la fremdaj radiosendoj kaj la konvinko pri la neceso starigi lingvon, facilan kaj perfektan, kiel interkomprenilon inter la radioistoj ĉiulandaj, decidigis la Nacian Radiodissendan Asocion organizi kurson de tiu idiomo, laŭ la ekzemplo de stacioj tiel gravaj, kiel tiuj de París, Roma, Stuttgat, Hamburgo, k. c., kiuj jam estas tion farintaj depost kelke da tempo kun kreskanta sukceso.

Tiacele, post konsento de la konsilantaro de tiu Asocio kun la Esperantista Kataluna Federacio, oni difinis kiel profesoron de la kurso S-ron. Arturo Doménech Mas, persono tre ŝatata inter la esperantistoj kaj havanta grandan praktikon en la lernigado de Esperanto, kiu komencos radii siajn lecionojn el nia sendstacio, je la 21ª horo de la 8ª nunmonata (aprilo), daŭrigante ilin regule ĉiun merkredon je la sama horo.

Ni ne dubas pri la favora akcepto kiun meritos tiu novaĵo inter niaj radioaŭskultantoj, kiuj sendube konvinkiĝos pri nia intenco kaj klopodoj por ke nia

Sección Radio-Esperanto

El movimiento universal de la radiodifusión, que aumenta de día en día, favorece grandemente nuestro asunto esperantista, que, como previmos desde el primer momento, será un necesario e imprescindible auxiliar que habrán de adoptar todas las sociedades de radio en general.

Aparte las noticias que ya conocen nuestros lectores, sobre la adopción del Esperanto en las más importantes radioasociaciones internacionales, publicamos las siguientes, dignas de conocerse, que son una prueba de nuestra afirmación:

«Un curso de Esperanto : en Radio-Barcelona :

La importancia cada día mayor que el idioma auxiliar internacional Esperanto va adquiriendo en las emisiones extranjeras, y el convencimiento de la necesidad de la implantación de un lenguaje, fácil y perfecto, como medio de intercomprensión entre los radioistas de todos los países, han decidido a la Asociación Nacional de Radiodifusión a organizar un curso de aquel idioma, siguiendo el ejemplo de estaciones tan importantes como las de París, Roma, Stuttgart, Hamburgo, etc., etc., que ya lo vienen efectuando desde algún tiempo con éxito creciente.

Con tal objeto, puesta de acuerdo la directiva de esta Asociación con la Federación Catalana de Esperantistas, ha sido designado como profesor del curso don Arturo Doménech Mas, persona de gran prestigio entre los elementos esperantistas y de larga práctica en la enseñanza del Esperanto, el cual empezará a radiar sus lecciones desde nuestra emisora, a las 21 del día 8 del corriente y las continuará con regularidad todos los miércoles, a la misma hora.

No dudamos de la favorable acogida que esta innovación merecerá de nuestros radioescuchas, ni de que en ello verán todos una prueba de nuestro afán por-

stacio estu unu el la plej bonaj, kaj ni esperas ke la kurso estos aŭdata kun intereso de tre multaj lernantoj, kiuj, post iom da lecionoj, sen ia ĝeno, sen ia materia nek intelekta penado, sen ia elspezo, alvenos al la scipovo de tiel moderne-ga kulturinterrilatilo, kiel estas la helpa lingvo internacia Esperanto».

(El la grava revuo *Radio-Barcelona*, oficiala organo de la Nacia Radiodissenda Asocio).

que nuestra estación esté siempre a la altura de las mejores y esperamos que el curso será seguido con interés por muchísimos alumnos, los cuales, después de unas pocas lecciones, sin ninguna molestia, sin ningún esfuerzo material ni intelectual, sin ningún dispendio, se encontrarán con la posesión de tan modernísimo instrumento de relación y de cultura como es el idioma auxiliar internacional Esperanto».

(De la importante revista *Radio-Barcelona*, órgano oficial de la Asociación Nacional de Radiodifusión).

Esp. Radio Kalendaro

Jen la listo de radio-stacioj, kiuj regule disaŭdigas esp. kursojn, paroladojn, kantojn, k. t. p.—La indikitaj tempoj ĉe kelkaj stacioj iom varias.

Dimanĉe. Tgm. 12.10—12.20 h. MET Königswusterhausen, ondo 1500: Esp. programo.

Vesp. 8.15 h. OkcET, Radio París, ondo 1750: Esp. kurso (D-o Corret).

Lunde. Ptm. 4.45 h. MET Hamburg, ondo 395. Dek minutoj da Esperanto. (S-o Minor).

Vesp. 20.15 h. MET, URI Romo, ondo 425: Esp. kurso. (Depost 30.3).

Merkrede. Vesp. 7.30—8.00 h. MET Königsberg, ondo 463: Esp. kurso. (D-o Nitz aŭ s-o Schattat).

Vesp. 9.00 h. OkcET Barcelona, ondo 325: Esp. kurso. (S-o Doménech).

Vesp. 9.30 ĝis 10.00 h. MET København, Radiofoni Station, ondo 705: Esp. aranĝo. (S-o Lendorff).

Vesp. 7.00—7.40 h. MET Münster, ondo 410: Esp. kurso. (F-ino Adrian).

Ĵaŭde. Vesp. 7.30 h. MET München, ondo 485: Esp. kurso kaj legekzerco. (S-o Koch).

Vesp, 7.30—8.00 h. MET Stuttgart, ondo 443: Esp. kurso. (D-o Vogt).

Vesp. 8.00 h. OkcET Paris, Supera Poŝta-Telegrafa Lernejo, ondo 450: Esp. kurso. (Prof. Cart).

Calendario Radio-Esperanto

He aquí la lista de las estaciones radio, que transmiten con regularidad cursos, conferencias, cantos, etc., en esperanto.—Las horas indicadas en algunas estaciones varían algo.

Domingo. Mediodía, 12.10 a 12.20 MET (tiempo de la Europa media o central), Königswusterhausen, onda 1500: programa en Esperanto.

Noche, 8.15 OkcET (tiempo de la Europa Occidental), Radio París, onda 1750: curso de Esp. (Dr. Corret).

Lunes. Tarde, 4.45 MET Hamburgo, onda 395. Diez minutos de Esperanto (Sr. Minor).

Noche, 20.15 MET, URI Roma, onda 425: curso de Esp. (Desde el 30—3).

Miércoles. Tarde, 7.30—8.00 MET Königsberg, onda 463: curso de Esp. (doctor Nitz o Sr. Schattat).

Tarde, 9.00 OkcET Barcelona, onda 325: curso Esp. (Sr. Doménech).

Tarde, 9.30 hasta las 10 MET Copenhague, Radiofoni Station, onda 775: programa Esp. (Sr. Lendorff).

Tarde, 7.30—7.40 MET Munster, onda 410: curso Esp. (Srta. Adrian).

Jueves. Tarde, 7.00 MET Munchen, onda 485: curso Esp. y lectura de ejercicios (Sr. Koch).

Tarde, 7.30—8.00 MET Stuttgart, onda 443: curso Esp. (Dr. Vogt).

Tarde, 8.00 OkcET París, Escuela Superior Postal-Telegráfica, onda 450: curso Esp. (Profesor Cart).

Vendrede. Vesp. 7.00 h. MET Frankfurt, ondo 470: Esp. kurso. (Instr. Urban).

Vesp. 7.00 h. MET Moskva, ondo 450: Esp. kurso.

Sabate. Ptm. 3.24—4.00 h. MET Berlin, ondo 505: Esp. kurso. (Dir. Glück).

Vesp. 7.30—8.00 h. MET Königsberg, ondo 463: Esp. kurso. (D-o Nitz aŭ s-o Schattat).

Viernes. Tarde, 7.00 MET Frankfurt, onda 470: curso Esp. (Profesor Urban).

Tarde, 7.00 MET Moscou, onda 450: curso de Esp.

Sábado. Tarde, 3.25—4.00 MET Berlín, onda 505; curso de Esp. (Director Glück).

Tarde, 7.30—8.00 MET Königsberg, onda 463: curso de Esp. (Dr. Nitz o Sr. Schattat).

SCIIGOJ

Nia nelacigebla kaj agema pioniro S-ro Rikardo Redondo Ferrer lerta esperantisto kaj prezidinto de la Chiva Esperantista Grupo, mortis.

La valencia esperantistaro perdis unu el la plej entuziasmaj adeptoj de nia kara lingvo.

Ni funebras pro la perdo de la amiko kaj sendas al lia familio la intiman esprimon de nia sincera kondoleco.

Ni ricevis de nia malnova amiko kaj fervora esperantisto S-ro. Johano Bausells (Travesera 170, 1.º, 2.ª, Barcelona), kvin dek pesetojn, por helpi la daŭrigon de LA SUNO HISPANA.

Ni tre dankas nian amikon ne nur pro la mono, sed por la kuraĝaj vortoj, per kiuj varmigas nin.

Grandnombre oni preparas esperantistajn kongresojn dum la nuna kaj proksimaj monatoj, en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj.

Ni jam scias pri la hispanaj kongresoj: la IIIª de Iberiaj Esperantistoj, en Córdoba, la 9—12 majo; la XIIª de Kataluna Esperantista Federacio, en Palma de Mallorca, la 21—24 de l' sama monato.

NOTICIAS

Nuestro infatigable y activo campeón D. Ricardo Redondo Ferrer, experto esperantista y presidente que fué del Grupo Esperantista de Chiva, ha muerto.

El esperantismo valenciano ha perdido uno de los más entusiastas adeptos de nuestro querido idioma.

Estamos de luto por la pérdida del amigo y enviamos a su familia la íntima expresión de nuestro sincero pésame.

Hemos recibido de nuestro antiguo amigo y fervoroso esperantista D. Juan Bausells (Travesera 170, 1.º, 2.ª, Barcelona), cincuenta pesetas como ayuda a la publicación de LA SUNO HIPANA.

Mucho agradecemos a nuestro amigo no sólo por la ayuda monetaria, sino por las alentadoras palabras con las que nos anima.

Numerosos congresos esperantistas se preparan en el presente y próximos meses, en casi todas las naciones europeas.

Ya conocemos los congresos españoles: el III de Esperantistas Ibéricos, en Córdoba, del 9 al 12 de mayo; el XII de la Federación Esperantista Catalana, en Palma de Mallorca, del 21 al 24 del mismo mes.

Eksterlande, dum Pentekosto (unuaj tagoj de junio) okazos naciaj kongresoj en Francio (Clermont-Ferrand), Germanio (Magdeburg), Danio (Odense), Nederlando (Hilversum), k. a.—VI[a] Tutaŭstria Esperanto-Kongreso okazos en Salzburg la 8—10 aŭgusto, post la Universala Kongreso. Tiu ĉi en la nuna jaro havos eksterordinaran gravecon, ĉar oni intencas okazigi samtempe en la kongresurbo Genève (Svislando), dum la unuaj tagoj de aŭgusto, la *Someran Universitaton* pere de nia lingvo internacia. Tiu someruniversitato konsistos en prelegoj kaj klarigoj en Esperanto faritaj de famaj profesoroj ĉe la Ĝeneva Universitato pri pedagogio, psikologio, lingvo-scienco, fiziko kaj internacia juro, laŭ arangô ŝuldata al la plej gravaj institucioj rilate al tiuj sciencoj en la mondo. Tio estos kredeble granda antaŭenpaŝo en la vojo de propagando de Esperanto en praktikaj uzadoj.

En el extranjero, durante Pentecostés (primeros días de junio), se celebrarán congresos nacionales en Francia (Clermont-Ferrand), Alemania (Magdeburgo), Dinamarca (Odensea), Holanda (Hilversum), etc.—El IV Congreso de Esperanto en Austria, tendrá lugar en Salzburgo del 8 al 10 de agosto, después del Congreso Universal. Este, en el presente año, tendrá extraordonaria importancia, porque se intenta celebrar al mismo tiempo en la ciudad del congreso, Ginebra (Suiza), durante los primeros días de agosto, la *Universidad de verano*, por medio de nuestra lengua internacional. Esta Universidad veraniega consistirá en conferencias y explicaciones en Esperanto hechas por célebres profesores en la Universidad de Ginebra, sobre pedagogía, psicología, lingüística, física y derecho internacional, con arreglo a organización debida a las instituciones relativas a estas ciencias en el mundo. Esto será, sin duda, un gran avance en el camino de la propaganda del Esperanto en los usos prácticos.

Plie ni rememoras aliajn gravajn kongresojn: tiujn de Internacia Jura Komitato de Radio kaj Internacia Unio de Radio-Amatoroj, en París, 16—20 aprilo: kaj tiujn de Internaciaj Konferencoj por la uzado de Esperanto en la puraj kaj aplikitaj Sciencoj—kaj por la uzado en Komerco kaj Industrio, ankaŭ en París, de la 14[a] gis 16[a] majo.

Además, recordamos otros importantes congresos: los del Comité de Derecho internacional en la Radio y Unión Internacional de Radio-aficionados, en París, 16—20 abril; y los de las Conferencias Internacionales para el uso del Esperanto en las Ciencias puras y aplicadas—y para el uso en el Comercio y la Industria, también en París, del 14 al 16 de mayo.

Verŝajne, post tiuj grandaj manifestoj montrantaj la forton de nia movado, multe alproksimiĝos la tago de nia fina triumfo ĉe la oficialaj tutmondaj medioj.

Es verosímil que, después de estas grandes manifestaciones que ponen de relieve la fuerza de nuestro movimiento, se ha de aproximar mucho el día de nuestro triunfo final en los medios oficiales de todo el mundo.

Antaŭ kelkaj tagoj estis inaŭgurata en Valencio, ĉe hotelo Reina Victoria, trikilovata sendstacio *Radio-Valencia*, ondlongeco 400 m., kiu tre bone sukcesis kaj perfekte funkcias. La Komitato de nia Grupo Esperantista faris la unuajn klopodojn por ke ĝi enmetu en sian progra-

Hace pocos días fué inaugurada en Valencia, en el hotel Reina Victoria, la estación emisora de tres kilovatios *Radio-Valencia*, longitud de onda de 400 metros, que tuvo un gran éxito y funciona perfectamente. La Junta de nuestro Grupo Esperantista hizo las primeras di-

mon esperantajn kursojn kaj konferencojn. Ni esperas ke baldaŭ povos esti venkitaj la malgrandaj malfacilaĵaj kiuj unuatempe prezentiĝis kaj ke ni povos anonci post nelonge la regulan partoprenon de niaj samideanoj en la radiodissendaj programoj de la unua Valencia sendstacio.

ligencias para que aquélla incluya en su programa cursos de esperanto y conferencias sobre el mismo. Esperamos que pronto podrán ser vencidas las pequeñas dificultades que en el primer momento se presentaron y podremos anunciar en breve la constante participación de nuestros correligionarios en los programas de radiodifusión de la primera estación emisora de Valencia.

Nia eminenta samideano S-ro. Leonardo de Torres Quevedo, delegito de la Ministerio de Publika Instruado por reprezenti nian landon en la konferenco de Parizo, ricevis tiom da leteroj kaj gratuloj de la hispanaj esperantistoj, ke por li estas tute neeble, respondi ilin unuope; tial, per letero ĵus ricevita, li petegas de ni ke pere de LA SUNO HISPANA, ni esprimu al ĉiuj skribintoj lian koran dankon, mendon, kiun ni plezurege plenumas.

Nuestro eminente *samideano* D. Leonardo de Torres Quevedo, delegado por el Ministerio de Instrucción Pública para representar a nuestro país en la Conferencia de París, ha recibido tal número de cartas y felicitaciones de los esperantistas españoles, que para él es completamente imposible contestarlas individualmente. Por ello, según carta que acabamos de recibir, nos suplica que por medio de LA SUNO HISPANA, expresemos a todos los que le han escrito su íntimo agradecimiento, encargo que con mucho gusto cumplimentamos.

Kiam tiu-ĉi numero estis jam en presejo, ni ricevis la viziton de nia samideano el kordovo S-ro. Vázquez de la Plaza, kiu faras apostolaŭ vojaĝon por Esperanto.

Cuando el presente número entraba en máquina, recibimos la visita del *samideano* de Córdoba Sr. Vázquez de la Plaza, quien realiza un viaje de propaganda de Esperanto.

IIIa Iberia Kongreso Esperantista, Kordovo

KVARA KAJ LASTA KOMUNIKO

1e *Aliĝintoj* (tria listo).

20. S-ro. Francisco Serrano Olmo, Córdoba.
21. F-ino. Palmira Castellví, Barcelona.
22. S-ino. Luisa García García, Badajoz.
23. S-ro. Luis Campos Suay, Badajoz.
24. » Rafael Castejón Martínez de Arizal, Córdoba.
25. » José de la Torre y del Cerro, Córdoba.
26. » Rafael Vázquez Aroca, Córdoba.
27. » Isidoro Díaz Maqueda, Tocina (Sevilla).
28. » Antonio Mármol Cordero, Villanueva Minas (Sevilla).
29. » Juan Moros Ojeda, Villanueva Minas (Sevilla).

30. » Juan Serrano Olmo, Córdoba.
31. F-ino. Sara Maynar Escanilla, Zaragoza.
32. S-ro. Manuel Maynar Barnolas, Zaragoza.
33. » Antonio Gil Muñiz, Córdoba.
34. » Benito Sánchez de Ibargüen, Corbacho (Córdoba).
35. » Delfí Dalmáu, Barcelona.
36. » Francisco Gorgues Torresdelflor, Barcelona.
37. » Antonio del Pozo, Córdoba.
38. » Jerónimo de Córdoba, Sevilla.
39. » Carlos Martínez Fernández, Sevilla.
40. » Luis del Valle, Sevilla.
41. » Manuel Isnardo, Sevilla.
42. » Ildefonso Montero, Sevilla.
43. » Natalio Perianes, Sevilla.
44. » José Rodríguez Tamarit, Sevilla.
45. » Manuel Carmona Canelo, Sevilla.
46. » Miguel Moreno Castillo, Sevilla.
47. » Joaquín Escacena, Sevilla.
48. » Antonio González, Sevilla.
49. » Cristóbal Rodríguez Pérez, Sevilla.
50. » Julián Romero Palomino, Sevilla.
51. » José Llorca Rosado, Triana (Sevilla).
52. » José Japón González, Sevilla.
53. » Antonio Velázquez, Sevilla.
54. » Eduardo Moreno Caballero, Sevilla.
55. » Santiago Ortega, Sevilla.
56. » Francisco Martín Román, Sevilla.
57. » Juan Kantek, Cádiz.
58. » Juan del Pozo Candiles, Triana (Sevilla).
59. » Ramón Fernández Rico, Sevilla.
60. » Tomás Morillas, Sevilla.
61. » Cristóbal García Cruces, Sevilla.
62. » José Fernández Ruiz, Sevilla.
63. » Eugenio Aresti, Bilbao.
64. » Francisco Azorín, Córdoba.
65. » Manuel Bausells, Barcelona.
66. » Juan Bausells, Barcelona.
67. » Rogelio Luque Díaz, Córdoba.
68. » José Rubio Morales, Pueblo Nuevo del Terrible (Córdoba).
69. » Manuel Fernández Moreno, Utrera (Sevilla).
70. » Grupo Esperantista, Baracaldo.
71. » Maximino Ribó, Barcelona.
72. » Rómulo S. Rocamora, Barcelona.
73. » Joseph Berger, Córdoba.
74. » Juan Canales García, Montoro (Córdoba).
75. » Juan Anguita Galán, Jaén.
76. » Juan Lamoneda, Jaén.

Al ĉiuj ĝis nun aliĝintoj, kiuj pagis la kongreskotizon, ni sendis la membrokarton. Kiu eble ne estas ĝin ricevinta, bonvolu sin turni al la sekretario, José Berger, Claudio Marcelo, 18, Córdoba.

2ᵉ *Alvenintaj proponoj.*

A. De Grupo Esperantista Pacense, Badajoz:

1) Pri publika elmeto de priesperantaj konstantaj afiŝoj kun nacilingva teksto.

2) Pri kolekto de ĉiuj dokumentoj pri Esperanto kiel klara telegrafa lingvo; peto al la registaro ĝin rekoni tia.

3) Pri kolekto de ĉiuj fremdnaciaj oficialaj dokumentoj rilatantaj Esperanton por havi argumenton ĉe la propralanda registaro.

B. De S-ro. J. Berger, Córdoba.

1) Pri Esperantaj ekzamenoj.

C. De S-ro. Angel Valdepeñas, Barcelona.

1) Pri daŭrigo de eldono de propaganda broŝureto: «Todo el Esperanto por diez céntimos».

3ᵉ *Kongres-programo.*

Sabato 9ª de majo:

Dumtage alveno de la gekongresanoj.

Vespere: Interkonatiĝa kunveno.

Dimanĉo 10ª de majo:

Matene: Solena malferma kunsido.

Posttagmeze: Ekskurso en la montaron.

Vespere: Amuzoj.

Lundo 11ª de majo:

Matene: 2ª laborkunsido.

Posttagmeze: Vizito al la urbo, Moskeo kaj muzeoj.

Vespere: 3ª laborkunsido.

Mardo 12ª de majo:

Matene: Ferma kunsido.

Posttagmeze: Ekskursoj.

Merkredo 13ª de majo:

Ekskurso al Sevilla.

Jaŭdo 14ª de majo:

Ekskurso al Granada.

La *ekspozicio* estos malfermita dum la tuta kongres-semajno.

4ᵉ *Kongresbulteno.*

Dum la kongrestagoj oni eldonos specialan bultenon ĉiutagan presotan sur sama papero kaj en la sama grandeco kiel la kongres libro, tiel ke oni povos ĝin kunigi kun la libro, por havi kompletan kongres-dokumentaron.

5ᵉ *Akceptejo.*

Ĝi troviĝas en la oficejo de S-ro. Francisco Serrano Olmo, strato Ambrosio Morales, 10. Ni zorgos ke ĉe alveno de la vagonaroj sabaton la 9ᵃⁿ kaj dimanĉon la 10ᵃⁿ de majo estos ĉiam samideano en la stacidomo, kiu akompanos la alvenintajn kongresanojn.

6ᵉ *Fin-rimarko.*

Jen la lasta komuniko. Pli detalaj informoj pri aferoj koncerne la kongreson estos ĉiam haveblaj en la Akceptejo. Al ni nur restas la bela devo esprimi nian sinceran dankon al ĉiuj helpintoj, ĉu per aliĝo, ĉu alimaniere. Saluton al ĉiuj kaj koran bonvenon en Kordovo!

F. SERRANO OLMO, *Prezidanto.* J. BERGER, *Sekretario.*

TIPOGRAFIA MODERNA, A C. DE M. GIMENO, PRIMADO REIG (antes Avellanas, 11, VALENCIA